

& La leono, la vulpo kaj la azeno:

< Minore rekante 22 el 31 batoj por strofo, entute 310 paŝoj dum 4 minutoj. Maĵore rekante 10 el 19 batoj por strofo, entute 190 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per varianto de melodio maĵora de Ora Koko kaj nova rekantaĵo. Alternativaj melodio minora kaj rekantaĵo estas tiuj de Harpa rimaĵo (Hørpu ríma), kiun li tradukis de feroa.>

(#Melodioj:

(

(#Minore: <:31> a;La /LaLa SiLa TiTi TiTi; TiLa SoFa MiMi; LaaaLaLa LaTi doTi LaTi; do Ti La a; La SiLa TiTi TiTi; TiLa SoFa MiMi; Mi LaLa LaLa LaTi; do Ti La)

?

(#Maĵore: <:19> re /dore mifa soso somi; reerere mimi mire remi; dore mifa so somi rere; mimi mire doTi La a)

)×10)+

(&Strofoj:

'1

(&Minore: Le/ono, vulpo kaj azeno,

(×:; - **vin invitas kuri** - . ;)

ĉasis en kuna entrepreno

(×:; **Sorĉistoj** ; **Estu ĉe l' junulino** ; **vin invitas kuri** ; **ilin akceptu zorge** ; **sorĉistoj!**))

?

(&Maĵore: Le/ono, vulpo kaj azeno ;
ĉasis en kuna entrepreno.

(×: **Al azeno neniu bono ; venas de leo2no.**))

'2 Ĉasaĵon riĉan ili predis, ; kaj tiam la leon' dekretis,

'3 ke la azen' dividu juste. ; Ĉi tiu en tri partojn ĝuste

'4 egalajn ĉion do disdonis, ; poste "Elektu!" — li proponis.

'5 Kolere la leon' distranĉis ; ĝin per la ungoj, kaj ĝin manĝis.

'6 Nun metis la leon' ordonon, ; ke l' vulpo faru la disdonon.

'7 Ĉi tiu lokis preskaŭ ĉion ; en unu amason, nur porcion

'8 tre magran lasis ĝi retene. ; "Ho! — diris la leon' serene —

'9 Jen la kalkulo senerara! ; De kiu do vi, vulpo kara,

'10 lernis dividi tiel lerte?" ; "El sorto de l' azeno, certe!"